



«LE GROUPE ESPERANTO DU MAINE» SALUTAS VIN!



Bonvenigaj vortoj

*«Ne freneziĝu serĉante perfektan,
kelkaj difektoj estas gravaj»*

Paulo Coelho

Enhavo

Sarta esperanta aktualaĵo	P1
Lingva evoluo (tria parto)	P2-3
Homaj Rajtoj kaj CED	P4

Charles Baudelaire

1821-1867, franca poeto

«La Floroj de l'malbono»



LA KATOJ

Fervoraj geamantoj, doktuloj plej senridaj,
Per sama gusto amas, je pleno de l' sezono,
La katojn, fortajn, mildajn, orgolojn de la
domo,
Ĉar same fridotimaj kaj same hejmosidaj.

Amikoj de la scio, amikoj de l' volupto,
Silenton ili serĉas, hororon de l' tenebro,
Ereb' ilin elektus tajdbestoj de l' funebro,
Se povus ĉi-fiero kliniĝi al servuto.

Revante ilin prenas la noblon de la pozo
De tiuj grandaj sfinksoj kuŝantaj en ripozo
Kaj ŝajne ekdormantaj en rev' senfin' ajna.

Per sparkoj sorĉaj fajras la lumo erotika
Kaj brilaj oraj punktoj, kiel de sablo fajna
Eklumas en prunelo mistera kaj mistika.

Serĝo Elgo - Georges Lagrange



LA KATOJ



Amantoj fervorkoraj, doktuloj morrigidaj
Tute egale amas en ties maturplejo
La fortajn mildajn katojn, orgolojn de l' loĝejo,
Simile frido-timajn, simile hejmo-sidajn.

Amikojn de l' scienco kaj de l' volupta ludo,
Ilin silent' altiras kaj nokthororo febra ;
Erebo ilin jungus al sia ĉar' funebra,
Se ili povus klini la fieron al servuto.

Revante, ilin prenas la pozojn noble molajn
De l' grandaj sfinksoj, kiuj en la dezerto, solaj,
Kuŝante ŝajnas dormi en ia sonĝ' sen limo;

El la fekunda lumbo magiaj sparkoj elas,
Kaj etaj or-parceloj, kiel subtila glimo,
Al ili la miksitajn pupilojn svage stelas.



Kalocsay, Waringhien



1887-2023

La artefarita lingvo Esperanto kaj evoluo de kvar naturaj lingvoj

Tria parto 1945 – 2023

E.o havis kaj konservas gravan influon en Ĉinio kaj penetras sudamerikon kaj Afrikon. Nun ĝi havas klubojn de junuloj tre aktivaj en la ekologia tendaro. Estas ankaŭ granda ĉeesto interrete. Danke al tiu ilo, ĉiuj havas la eblecon lerni sole Esperanton pere de senpagaj kursoj. Samtempe la ekologia problemo, hodiaŭ, sukcesas unuigi ambaŭ tendarojn de esperantistoj: SAT (Sennaciecia Asocio Tutmonda) kaj UEA (Universala Esperanto Asocio). La aĝ-averaĝo de la esperantistoj en Eŭropo ŝajnas alta kaj la varbado estas malfacila.

La nombro de du milionoj de esperantistoj sur la terglobo estas probabla sed ilia lingva kapableco ne estas mezurebla. Ĉiujare, tamen ekzistas grandaj internaciaj kongresoj celantaj spontanajn interŝanĝojn.

La eŭska lingvo trapasis specialan fazon de malfacila politika situacio ĉar aperis tre forta kaj brutala klandestina organizacio kontraŭ la hispana milita katolika diktaturo. La paradokso estis, ke la eŭska lingvo atingis grandan famon, preskaŭ sen disvolviĝo, ĉar, ekzemple, la klandestinaj bultenoj de la kontraŭleĝa grupo estis skribitaj ĉefe en kastilia lingvo. La grandega ekspansio komenciĝis de la statuto de aŭtonomeco en 1978 kaj la oficiala instruado en eŭska lingvo.

La eŭska lingvo akiri tiam sian normalan evoluadon kiel naturan lingvon sen politikaj bridoj aŭ administracia premo. Tamen multe da loĝantoj en la eŭskaj provincoj de la aŭtonomeco parolas la kastilian lingvon. La estonteco montros ĉu la dulingvismo estas ebla kiel en grandaj partoj de la katalana aŭtonomeco.

La hebrea lingvo konfirmas siajn trajtojn de artefarita lingvo luktante kontraŭ la supoza barbareco, sed ne povas plu silentigi la kritikojn kontraŭ la cionismo.

La makedona lingvo ankoraŭ estas en sia stato de granda simileco kun la bulgara lingvo, tamen la miksaĵo kun la serba lingvo ofte malhelpas la komprenon. Tion celas la makedona politiko.

La valencia lingvo ne konkeris sufiĉe da politikaj subtenoj por aspekti (male de la makedona kazo) kiel natura lingvo. La naturaj lingvaj malsamecoj inter la valencia kaj la kataluna lingvoj ne evidentiĝas.

Unua konkludo:

el tiuj kvar tiel nomitaj naturaj lingvoj, finfine, nur unu estas natura (la eŭska lingvo).

La eŭska lingvo atingis sian apogeon kaj gravan lokon en sia regiono.

La hebrea lingvo estas kurioza kazo de preskaŭ artefarita lingvo politike imponita.

La makedona lingvo estas kaj natura lingvo kaj politika invento.

La valencia lingvo estas nur varianto de la kataluna lingvo kaj politika malsukceso.

Dua kaj lasta konkludo: Kartezio en 1629 opiniis tiel pri «iu universala lingvo»

«[...] mi konsideras, ke tiu ĉi lingvo estas ebla kaj ke oni povas malkovri la sciencojn de kiuj ĝi dependas [...] pere de ĝi la kamparanoj povus pli bone juĝi la veron de la aferoj ol tion kion faras nun la filozofoj. Sed vi ne esperu vidi tiun lingvon uziĝintan iun tagon. Tio antaŭsupozus grandajn ŝanĝojn en la aferordo kaj necesus, ke la tutmondo estu terparadizo. Tio estus nur bona propono nur en la landoj de la romanverkistoj.» (*)

Tiel mi komprenas la penson de Kartezio: la kamparanoj signifas, ke la laborista klaso estas kapabla organizi la socion pli bone ol [la projektoj de la] filozofoj. Tiel, telepatie «!», la kartezia rapida aludo al la problemo inter laborista klaso kaj klera reganta klaso anoncis la analizojn de Pierre-Joseph Proudhon pri la jugo de la Ŝtato. Tamen Kartezio konscias, ke li mem troigis, kiam li asertis, ke neniam povus okazi tia hipotezo. Tamen li ne aludis al la neebleco (probabla aŭ ne) de sia intuicio pri artefarita lingvo helpanta inklusive al la kamparanoj. Kartezio ne citas la *Memvola-n servitudo-n* [1549] de Étienne de la Boétie, kiun li ne povis ignori. Do Kartezio lasis al ni esperon atingi niajn celojn.

Ĉu la aserto de Kartezio estas prava? Ĉu ĝi validas hodiaŭ? La espero, la hilelismo de Zamenhof, estus respondoj. La lukto por neniigi la ŝajnan aserton de Kartezio [«nur en la landoj de la romanverkistoj»] kaj konkretigi la aserton de Zamenhof pri etika estonteco estas nia tasko.

(*) Teksto de Kartezio, france, en 1629 : «[...] je tiens que cette langue est possible, et qu'on peut trouver la science de qui elle dépend [...] par le moyen de laquelle les paysans pourraient mieux juger de la vérité des choses, que ne font maintenant les philosophes. Mais n'espérez pas de la voir jamais en usage ; cela présuppose de grands changements en l'ordre des choses, et il faudrait que tout le monde ne fût qu'un paradis terrestre, ce qui n'est bon à proposer que dans le pays des romans.»

Frank Mintz

Resumo de kelkaj mallongaj rimakoj pri la vidpunkto de Kartezio de la GEM (Esperantista grupo de Le Maine)

Indas substreki, ke en la kartezia epoko la «filozofa klaso» signifis nur kvin procentoj de la loĝantoj de la lando, kiuj havis kulturon precipe pere de la latina lingvo. La franca lingvo ne estis tre disvolvita inter la naŭ dek kvin procentoj de la aliaj loĝantoj, kies majoritato laboris kiel kamparanoj.


Kartezio skribis, ke «iu universala lingvo, tre facile lernebla, prononcebla kaj skribebla, kaj plej grave, lingvo kiu helpus la racion**». Samtempe li forigis la aliajn lingvojn (latine, france) kiujn li scipovis.

Kartezio konscias la gravecon de iu artefarita lingvo por organizi la interŝanĝon inter ĉiuj loĝantoj. Tiu konstato estas ĉiam aktuala.

** « une langue universelle, fort aisée à apprendre, à prononcer et à écrire, et ce qui est le principal, qui aiderait au jugement ».



La valencia flago



La eŭska flago



La makedona alfabeto



La hebrea alfabeto

UNIVERSALA DEKLARACIO DE LA HOMAJ RAJTOJ

Adoptita kaj proklamita de Rezolucio 217 A (III) de la Ĝenerala Asembleo, 10^{an} de decembro 1948

Artikolo 6

Ĉiu rajtas esti ĉie agnoskita jure kiel persono.

Artikolo 7

Ĉiuj homoj estas jure egalaj, kaj rajtas sen diskriminacio al egala jura protekto. Ĉiuj rajtas ricevi egalan protekton kontraŭ kia ajn diskriminacio, kiu kontraŭas tiun ĉi Deklaracion, kaj kontraŭ kia ajn instigo al tia diskriminacio.

Artikolo 8

Ĉiu rajtas ricevi de la kompetentaj naciaj tribunaloj efikan riparon pro agoj, kiuj kontraŭas la fundamentajn rajtojn, kiujn li havas laŭ la konstitucio aŭ la leĝoj.



La teksto de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj disponeblas ĉe la [retejo de Unuiĝintaj Nacioj](#).